



ESPERANTISTA JUNULARO

Helpilo por junaj Esperantistoj.

Ligilo por junulaj organizaĵoj.

Celo: Tutmonda junula amikaro.

Oficiala organo de:

Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara
kaj de **Skolta Esperantista Ligo**

Abonprezo: jara por 8 numeroj la 4-
obla afranko de letero al eksterlando aŭ
0,24 da usona dolaro por landoj kun pli
malalta afranktarifo. Rabato por pli ol
10 ekzempleroj

Anoncpreso: po 1 kvadratcentimetro
la prezo de 1 numero de EJ = 1/2 ekster-
landa leterafanko. Anonceto de 10 vortoj
(krom 1 adreso) la sama kiel duonjara
abono. Rabato por plurfaj aperado

Eldonanto kaj posedanto: Tutmonda Esperanto-Asocio Junulara.

Responda redaktoro: Rudolf Pivl, Trautenau, Pragerstraße 16 (Ĉeĥoslovakio)

Redakciaj kunlaborantoj:

A. Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstraße 17 (Germ.); — Norman Booth, Netherton,
Huddersfield (Angl.); Andreo Rácz, Kapošvár, Erzsébet u. 8 (Hung.).

Alĝojn kaj pagojn sendu al via landa ĉefdelegito (vidu liston sube!), aŭ se tia ne
ekzistas, rekte al la

Administracio, A. Neupert, Leipzig-Möckern, Wedellstraße 17, Germanujo.

Pagu per via nacia mono en rekomenditaj leteroj.

ABONOJN NI NUR AKCEPTAS, SE ILI ESTAS AKOMPANATAJ DE LA ABONPAGO!

Ĉefdelegitoj en landoj:

Aŭstra: Max Ultmann, Wien, IX., Wagnergasse 9/18

Belga: Willy de Schutter, Touwstr. 30, Antwerpen.

Brita: Mary Riley, The School House, Clifton-cum-Norwood, Birstwith, Harrogate,
Yorkshire

Bulgara: Dimitr P. Tuĝarov, Tatar Pazarĝik

Ĉeĥoslovaka: Csáder Sandor, Bratislava, Rómer Flóris utca 8/1

Dana: Johannes Kjoer, Staalstr. 14, Odense

Estona: Rudolf Grepp, Vaset 13-8, Tallinn

Franca: Marcel Boubou, 96. rue St. Marceau, Orléans (Loiret)

Germana: Curt Günthel, Dresden-Cotta, Weidenthalstr. 36, Poŝtĉeko Dresden 27537

Hispana: Ferd. Montserrat, Barcelona, Villarroel 107. 2 o. 2 a.

Hungara: György Steiner, Győr, Apátúr utca 8

Itala: Deodato Vaolizzi, Via Seggio 20, Aversa

Jugoslava: Fran Janjić, Vinkovci, Kumičićeva 60

Litova: H. Berkovič, Kaunas, Rotušes aikšte 15

Nederlanda: Evert de Wolf Jr, Haarlem, Joh. de Breukstr. 34

Pola: Adolfo Oberrotman, Warszawa, Krak-Przedm. 10

Sveda: Em. Sönderlund, Stranden, Vejbysslatt

Enhavo: Al niaj legantoj; Perspektivoj; † Sino Klara Zamenhof; † P. v. Medem;
Du fabloj de Lessing; POR NIAJ JUNAJ: La barilo en la lerneja korto; JUNULA
LITERATURO: La Atestantoj; La tragedio de l' homo; SKOLTISMO: Skoltaj ter-
minoj; Skolta Esperantista Ligo; OFICIALA INFORMILO DE T. E. A. J.; ONI
DEBATAS: Kial ne plivigliĝas la korespondado? „-ujo; -io“; DIVERSAĴOJ;
Leterkesto; Anoncetoj; Anoncoj.

Pro teknikaj kaŭzoj

tiu ĉi numero povas aperi nur la 25^{an} de Januaro.

La venonta, 25^a, aperos regule la 1^{an} de Marto.

Red. de E. J.

Al niaj legantoj!

„Esperantista Junularo“ komencas per ĉi tiu numero sian sesan vivjaron! Ankoraŭ infaneto ĝi estas, sed pligrandigis ĝia vivforto spite de la gravaj malsanoj, kiujn ĝi travivis precipe en la pasinta jaro, kiam ĝi perdis sian fondinton kaj redaktoron, kiam mankis al la presejo kaj ekspedejo tiu spertulo! Sed la junularo mem savis la junan entreprenon! Fervoraj junuloj kreis dum la Viena kongreso novan fundamenton, elektis novan estraron. Kvankam la financa flanko ankoraŭ ne estas kotentiga, ni espere rigardas la novan jaron! La konstanta kreskado de nia anaro, la kunhelpo de nia fidela delegitaro ebligis pluan plibonigon de „Esperantista Junularo“ en 1925!

Neupert.

Perspektivoj.

Pasis 1924, ni nun staras sur la sojlo de la nova jaro, kaj pripensas kaj ekzamenas.

Pri la laboro nia dum la pasinta jaro ni povas esti kontentaj, grandaj, gravaj sukcesoj estas post ni: solidiĝo de T. E. A. J., plibeliĝo ĉiurilata de „Esperantista Junularo“, kiu fariĝis jam grava fakto en la Esperantista movado junulara. Kaj sukcesis tio al ni, malgraŭ ke ni laboris en la plej malfavoraj cirkonstancoj: grave malsaniĝis nia ĝisnuna gvidanto, s-o Robin, kaj solaj, nespartaj ni staris meze de

financa kaj fizika marĉo. Sed la junularo per si mem savis siajn asocion kaj gazeton, novaj kapoj troviĝis, streĉiĝis, kaj ili sukcesis ne nur savi, sed eĉ pligrandigi la asocion. Precipante dankon por sia grandega laboro por T. E. A. J. ni ŝuldas al nia senlaca pioniro, s-o Neupert el Leipzig, ĉar ĉiuj sukcesoj preskaŭ troviĝas sur lia „konto“. Diri aliajn meritoplenajn personojn, kiuj helpis al ni, estus neblaĵo, ĉar estas tro multaj.

Ni ĵetu ankoraŭ rigardon en la novan jaron! Estu trankvilaj, junaj amikoj ĉiulandaj, ni ne plu bezonas timi, regula aperado de nia gazeto estas certigata, kaj espereble ni jam de la dua duonjaro 1925 povos efektiviĝi nian plej ardan deziron: monatan aperadon de nia gazeto. Ni faros nian plejblon por efektiviĝi tiun plej ardan deziron nian, vi faru la vian. Se ĉiu dua membro de T. E. A. J. estas gajninta novan abonanton, E. J. eliros monate, sen ke estus al ni necese plialtigi nian abonpagon. Laboru! La venko estas proksima.

Pivl.

Feliĉan novjaron
deziras al siaj abonantoj kaj
kunlaborantoj

Estraro de
„Esperantista Junularo“.

† S^{ino} Klara Zamenhof.

La 6^{an} de Decembro mortis en Varsovio la unua Esperantistino, la fidela kunlaborantino kaj edzino de nia Majstro, S^{ino} Klara Zamenhof. Mi persone nur tute supraĵe konis ŝin de la kongresoj. Dum la 20^a laborkunsido de Orientbohemiaj Esperantistoj okazinta la 14^{an} de Decembro en Hradec Králové S^{ino} Skleněčka post la malfermaj vortoj sciigis al ni la teruran novaĵon, kiun ni starante, kun granda emocio aŭdis. Neforgeseblaj restos al ĉiuj tiuj momentoj. Silente ni staris kaj sentis, ke denove la kruela morto iun elrabis el niaj vicoj, kiu al ni estis kaj restos kara. Sed ion ĝi ne povos forrabi: La sanktan spiriton, la internan ideon de Esperanto. **Ĝi vivos, kreskos, kaj venkos!**

Pivl.

† P. Medem.

Ĵus ni ricevis la teruran Hiobsciigon el Litovujo, ke mortis tie nia agema, senlaca pioniro Medem. La sciigoh ni ricevis de nia fidela delegito Berkovič. Jen lia letero:

. . . La trian de Januaro nia samideanaro enterigis sian plej grandan esperon, esperon samtempe por la tuta Litovujo, s-on P. v. Medem. Akompanis lin miloj da homoj, ĉar li estis konata ĉe la tuta loĝantaro Kown'a kiel tre bona homo. Ni Esperantistoj iris antaŭe kun verda standardo. Entombigon ĉeestis multaj delegitoj de diversaj societoj. La lastajn vortojn al la mortinto direktis s-o Dombrovski, s-o Ben-Ĉehaj, kaj s-o Joels kaj post entombigo ni kantis nian himnon, kaj tute rompitaĵi ni disiris, sed kun promeso honori lian memoron per fideleco al nia Esperanto, kaj helpi, batali por ĝia Interna Ideo, ĝis kiam ĝi venkos. . . .

Berkovič

Por niaj junaj.

Du fabloj de Lessing.

La paseroj.

Malnova preĝejo, kiu donis al paseroj multnombrajn nestojn, estis renovigata. Kiam tiu preĝejo nun staris novbrilante, la paseroj revenis por serĉi siajn antaŭajn loĝejojn. Sed ĉiuj nestoj estis fermmasonitaj. „Pro kio“, la paseroj kriis, „taŭgas do nun ĉi tiu granda konstruaĵo? Venu, ni forlasu la neuzeblan ŝtonamason!“

La hamstro kaj la formiko.

„Vi malriĉaj formikoj“, diris la hamstro, „ĉu estas necese, ke vi laboru la tutan someron, por kolekti tiom malmulte!“ „Aŭdu“, respondis unu el la formikoj, „se via provizo estas pli granda, ol vi bezonas ĝin, tiam pravas la homoj, kiam ili elfosas vin, malplenigas vian loĝejon kaj per morto punas vian rabistan avarecon“.

★

La barilo en la lerneja korto.

Orig. de Kastelano.

Berto kaj Elso, du dekjaraj knabinoj iris kune al la lernejo. Survoje Berto montris al sia kamaradino sian novan kaŭĉuk-pilkon, kiun ŝi estis ricevinta je sia naskiĝtago. Tiu ĉi pilko tre plaĉis al Elso kaj ŝi petis Berton lasi al ŝi la pilkon ĝis la paŭzo. Berto konsentis kaj prunte donis la pilkon al Elso. Antaŭ la lernejo ili devis disiri, ĉar Berto iris al la katolika lernejo kaj Elso iris al la protestanta lernejo. Ambaŭ lernejoj estis en la sama konstruaĵo. Sole fera

barilo partigis la komunan korton je unu porkatolika kaj je unu porprotestanta partoj. Al ĉiuj infanoj estis malpermesite de la geinstruistoj — eĉ nur alproksimiĝi je tiu ĉi barilo. Ĉiu parto timis la plendon de la alia flanko. La paŭzo je la deka venis. Malgraŭ la malpermeso Berto jam staris apud la barilo kaj senpacience atendis Elson kun la pilko. Baldaŭ ankaŭ Elso alvenis per longaj saltoj, redonis la pilkon trans la barilo kaj dankis kore. Sed, — ho, ve! — la instruistino de Berto vidis ŝin stari apud la barilo. Tuj ŝi vokis Berton. En la sama momento ankaŭ la instruistino de Elso rigardis tra la fenestro en la korton kaj ekvidis Elson. Ankaŭ Elso estis vokata. Ambaŭ infanoj ricevis pro malobeo ne nur riproĉojn — sed ankaŭ batojn. La barilo restis kiel teruraĵo longtempe en la memoro de la du knabinoj. Post unu jaro el la katolika kaj protestanta lernejoj fariĝis unuspeca lernejo. Berto kaj Elso estis nun en la sama klaso. Jam la unuan tagon ili planis forigi la terurigan barilon en la korto. Dum la paŭzo ili intencis realigi sian kriman planon. Sed — ho, surpriza fakto — ili venis tro malfrue. Aliaj infanoj, kiuj antaŭe estis ricevintaj batojn pro la sama krimo, jam detruis la barilon kaj tenante sin je la manoj, ili dancis ronde kaj saltis ĝoje ĉirkaŭ la ruinoj de la barilo. Unu monumento de malindulgeco ne plu ekzistis.



Por Grandkomercistoj !

Mi perigas la acetono de komercaĵoj ĉiuspecaj, precipe pogranda.

Adolf Rumpf, del. de T. E. A. J. Rehe (Bez. Wiesbaden) Germanujo.

Junula literaturo.

La Atestantoj.

Itala legendo. El la hebrea lingvo esperantigis Sz. Goldfeder en Hoszeza, Rowne.)

Unufoje iu nobelo, loĝanto de urbo Venecio, je nomo Vitaliso, iris arbaron ĉasi kaj devojiĝis tie. Longe li vagadis en la malhela densa arbaro, kiu en tiuj jaroj etendiĝis ĉirkaŭe per siaj altaj branĉriĉaj arboj. Vane serĉis la ĉasisto vojeton, vane li serĉadis homan budeton — li nur enprofundiĝis en arbarmallumon. Anstataŭ vojeton la ĉasisto nur renkontis abismojn, ŝtonegojn, riveretojn kaj marĉojn. Anstataŭ homa voĉo li aŭdis kriegojn kaj blekegojn de sovaĝaj birdoj kaj bestoj kaj bruon de multaj akvoj.

Venis la nokto kaj la mallumo pligrandiĝis, kaj granda timo ĉirkaŭkaptis Vitalison. Li decidis, ne moviĝi de sia loko ĝis la tagiĝo. Li paŝis nur kelkajn paŝojn por trovi pli oportunan lokon kaj subite — ho! ekskuiĝis la tero sub liaj piedoj kaj — li englitiĝis kiel pilko en profundon kavernon. En la densa mallumo, tie reganta, li nenion vidis ĉirkaŭe, kaj li provis ĉirkaŭpalpi la flankojn de la kavo esperante trovi ian arbranĉon aŭ alian, per kio li povus elgrimpi el la kavo. Sed kiu povus priskribi lian teruron, ekaŭdinte de proksime teruregajn voĉojn: kriego, ĝemego kaj murmureto. Pro grandega timo Vitaliso ne povis sin movi. Li alŝoviĝis al la kavmurego, kaj tutan nokton li tiel staris. Finfine ektagiĝis. Eliris la suno, sed la kavo estis tiel profunda, ke la lumo ne povis trapenetri la densaĵon de la arboj. La mizeregulo kiel antaŭe staris en la mallumo kaj nenion vidis. Kiam li nur ekmovis brakon aŭ piedon, li tuj ekaŭdis teruregajn voĉojn, kiuj lin maltrankviligis tutan nokton. Eĉ ŝajnis al li unufoje, ke iu mola kaj varma korpo lin tuŝas, ke malvarma mentono

tuŝas lian vizaĝon kaj ian spiron li sentas de vivulo kun fajrantaj okuloj. Tio ĉi ja atestis, ke li enfalis en kavon de sovaĝaj bestoj. Vitaliso jam ĉesis esperi savon. Mortterura malsato kaj malespero forigis ĉiujn liajn fortojn, kaj pro grandega timo li komencis al si prezenti la teruregan minuton, kiam ekkaptos lin la sovaĝaj bestoj kaj disŝiros lin. Li fermis la okulojn, por ne vidi la proksimiĝantan turmentmorton.

Subite li ekaŭdis paŝojn: — Versaj-ne iu homido loĝas proksime. — „Savu! Savu min!“ ekkriis Vitaliso per ĉiuj fortoj. La preterpaŝinta homo estis malriĉa lignohakisto, kiu ĉiumatene iradis en arbaron al sia laboro. Ekaŭdinte homvoĉon vokantan je savo, li alpaŝis al la kavo, ĉar li antaŭsentis, ke iu homo falis tien. „Kie vi? Kiel vi venis tien ĉi?“ demandis la lignohakisto laŭte. „Irante ĉasadi mi en la arbaro devojiĝis, ekfalas kavon kaj la tutan nokton mi pasis tie ĉi. Je nomo de Dio kaj de ĉiuj Sanktuloj, savu min kaj mi rekompencos vin malavarege por via bonfaro.“ — „Mi ĉion laŭ mia povo faros, por vin savi“, rediris la lignohakisto. Matfeo — la nomo de la lignohakisto — prenis sian hakilon, forhakis longan malsekan branĉon kaj pintigis ĝin. „Sinjoro Ĉasisto“, diris li laŭte, „malfermu viajn okulojn: jen mi malsuprenigas al vi stangon, prenu kaj profundigu ĝin en la tero kaj per ĝi grimpu kaj eliru el la kavo.“

„Grandegan dankon al vi, bonfarulo!“ rediris Vitaliso, „per kio mi rekompencos vin, ke vi savis min de la morto?“ „Mi nenion deziras de vi“, respondis Matfeo, „sed se vi estas bonkorulo, vi donacos ion al mia fianĉino, ĉar mi kaj ŝi estas tre malriĉaj kaj ni volas festeni nian edziĝfeston.“ Post tiuj ĉi vortoj malsuprenigis Matfeo la stangon en la kavon, kaj li tuj eksentis ian pezan ŝarĝon kaj post minuto elsaltis el la kavo trans la stango grandega simio, kiu

malaperis en la arbardsaĵo. „Savu min Dio!“ ekkriis la lignohakisto, kaj pro granda teruro li faligis la stangon el siaj manoj kaj forpaŝis de la kavo. „Ĉu vi min lasos ĉi tie?“ ĝemegis Vitaliso, plorante, „mi petas vin je nomo de Dio, kompatu kaj savu min! Mi estas nobelo de Venecio, kaj mi donos al via fianĉino oron kaj arĝenton, se vi nur eltiros min el la kavo.“ Matfeo ekregis sian timegon ekaŭdinte la lastajn vortojn. Li ree fortranĉis branĉon kaj malsuprenigis ĝin en la kavon, kaj ĉitiofoje elsaltis el la kavo terurega leono. Matfeo tre ektimiĝante forkuris de tiu malbenita loko. Sed post kelkaj minutoj li ekhaltis, ĉar liajn orelojn atingis denove ploro kaj ĝemo de homvoĉo vokanta je savo. „Savu! savu min!“ petegis la malfeliĉa nobelo, „ĉu mi vere devas agonii ĉi tie pro malsato? Mi petegas vin, kompatu kaj savu min. Mi donos al vi, kion ajn vi postulu de mi. Mi donos al vi domojn, kampojn, arĝenton, oron, ŝafojn, bruton, sed nur ne forlasu min en la kavo.“ Matfeo triafoje suprenigis al li stangon. Sed, ho! per la stango li eltiris grandan serpenton, kiu ĉirkaŭvolvigis kaj forrampis arbaron.

La lignohakisto fariĝis kvazaŭ marmorkolono pro granda timo. La stango elfalis el liaj manoj, kaj li genufalis kaj preĝis. Li firme kredis, ke ne sovaĝaj bestoj eliris el la kavo, sed diabloj kaj fantomoj. Sed li ree ekaŭdis homan voĉon petantan pri savo, kaj Matfeo decidis jenon: „Je la voĉo ŝajnas kvazaŭ homo, — estas homploro kaj homĝemo, mi do provu ankoraŭ foje helpi al li.“ Kaj el la kavo la voĉo kriegis: „Ho, ne forlasu min! Mi donos al vi mian palacon kun ĉiuj ĝiaj ilaroj, se vi savos min. Mi juras, ke vi ricevos mian tutan havaĵon!“

Matfeo ekvigligis kaj ree malsuprenigis al li longan stangon. Pasis minuto kaj li eksentis pezan ŝarĝon sur la stango, ektiris ĝin kaj — nun li

vere suprentiris la homon. Vitaliso eksvenis pro la granda ĝojo kaj entalis en la manojn de Matfeo. Matfeo penege rekonsciigis lin kaj poste li elkondukis lin el la arbardsaĵo en freŝan aeron. Tie li donis al Vitaliso panon, trinkigis lin freŝan akvon kaj demandis la nobelon, ĉu li ne volas eniri en lian kabanon. „Savinto mia“, rediris Vitaliso, „per kio mi povos rekompenci vin pro via bonfaro?“ „Ho“, respondis Matfeo mallaŭte, „ja vi promesis al mi vian palacon kun ĝia ilaro kaj ankaŭ doton por mia fianĉino. Ĉi tiu donaco estas sufiĉa por mi.“ „Jes, jes“, rediris Vitaliso, de kiu jam foriris la morttimo, „kompreneble, ke mi rekompencos vin bone kaj vi estos la plej riĉa el miaj vilaĝanoj. En kiu vilaĝo vi loĝas?“ „En Kalino mi loĝas, sinjoro, sed ricevonte vian palacon en Venecio mi translokiĝos tien“. Kiam ili atingis la arbarbordon kaj antaŭ ili montriĝis la vastaj kampoj, nun Vitaliso diris: „Mi jam vidas la vojon kondukantan en la proksiman urbeton, de tie mi facile atingos mian domon. „Fartu bone Matfeo, estu benata pro via bonfarto“. „Kiam mi povos veni al vi por ricevi mian rekompencan, la palacon?“ demandis Matfeo. „Kiam vi nur ekvolos.“ Ili disiris, hejmenveninte Matfeo rakontis al sia fianĉino la okazintaĵon kaj pri ilia estonta feliĉo. Venontan tagon je tagiĝo la lignohakisto forpaŝis Venecion kaj post kelke da horoj li atingis la urbon. Li baldaŭ atingis la domon de la nobelo Vitaliso. Apud la pordego de lia palaco staris la gardisto, kaj Matfeo diris al li, ke li venis, ricevi la palacon donacitan al li de sinjoro Vitaliso. La gardisto rigardis lin tiel mirege, ĉar li ŝajnis al li kvazaŭ frenezulo. Sed kiam Matfeo persistis kaj ne volis cedi, unu servisto rakontis ĉi tion al Vitaliso. La nobelo eksciinte, ke venis Matfeo postuli la palacon kaj ĝian ilaron, tuj ordonis forpeligi lin honte. „Ne alie, ke nur frenezulo li estas“, diris

la riĉulo kapŝancelante. La servistoj moke kaj honte forĵetis la lignohakiston kaj li iris hejmen konfuzita kaj dolorigita. Survoje li pripensadis respondon, kiun li diros al sia fianĉino hejme.

Sed kia terurega timo ĉirkaŭkaptis lin, malferminte la pordon de sia kabanano! Sur la planko etendiĝis tri arbarbestoj: la serpento volviĝis ĉirkaŭ la pordo, la leono elektis kun la simio al si lokon apud la forno. „Ho, Dio“, ekkriegis Matfeo, „mi mem estas kulpa pri mia malfeliĉo“. Sed la leono levigis de sia loko, alpaŝis al sia savinto, kuŝigis sian kapon sur liajn genuojn kaj per sia lango li lekis liajn manojn. La serpento alrampis al la terurigita homo ĉirkaŭprenis liajn piedojn, kaj la simio eksaltis kaj staris sur lia dorso. La timo foriĝis de Matfeo kaj li rekompencis ilian amon kontraŭ amo. „Mi vidas“, diris la lignohakisto, ke vi bestoj estas pli bonaj kaj indaj ol homoj. Vitaliso, tiu nobelo, kiun mi savis de morto, nur ofendigis kaj malhontigis min, kaj jen vi alvenis al mi el la arbaro, por danki min pro mia bonfaro. Sed kion fari al mi? Jam du tagojn mi nenion perlaboris. Nun en mia budeto eĉ ne estas lignaĵo, por bruligi fajron, mi ne plu havas manĝaĵon kaj monon por festeni mian edziĝfeston. La bestoj nun eliris el lia budeto. Sed post unu horo la simio revenis kaj vokis lin. Matfeo postsekvis la simion, kiu apud lia budeto montris al li ligajon da lignetoj, kiujn ĝi kolektis kiel donaco al sia bonfarulo. Ankaŭ la leono alportis pezan ligajon da nutraĵo, kiun ĝi jam delonge kolektis kaj per sekaj folioj ŝirmis kontraŭ la sunradioj. En la ligajo estis du gazeloj, tri kaproj, leporoj kaj kunikloj. La koro de Matfeo pleniĝis kun ĝojo. Poste la serpento alrampis tenante en sia buŝo brilantan miregan ŝtonon. „Diamanto!“ ekkriis la plengoja Matfeo. En la juneco li aŭdadis, ke la serpento kaj la

skorpioj gardas kaŝitajn trezorojn. Nun li havas sufiĉe da lignaĵo por hejti, sufiĉege da nutraĵo kaj krome li do posedas grandan riĉaĵon, kaj nun li ekpovos festeni sian edziĝfeston. En tiu sama tago Matfeo rapidmarŝis Venecion, elserĉis juvelmagazenon kaj montris al la juvelisto la diamanton. La juvelisto ĉiuflanke esploris ĝin mirege rigardante la vizaĝon de la malriĉegulo, kiu estas la posedanto de tia riĉaĵo. „Kian prezon vi postulos por ĝi?“ demandis la juvelisto. La lignohakisto embarasiĝis, ĉar li ne sciis la prezon de tiaj objektoj. „Ducent guldenojn vi donu al mi por ĝi“, li diris. La juvelisto estis honesta homo kaj diris: „Mi vidas, ke vi ne scias la valoron de tiu ĉi diamanto. Estas do vidata, ke vi forŝtelis ĝin ie.“ Matfeo ektimis kaj respondis: „Ho, sinjoro, donu al mi, kiom vi povos pagi por ĝi, sed ne pensu, ke mi estas ŝtelisto. Ĉi tiu ŝtono estas donacita al mi de serpento, kaj mi kredis, ke ĝi estas diamanto.“ „Ĝi efektive estas diamanto“, rediris la juvelisto en mia longa vivo mi ankoraŭ ne vidis tiel miregan diamanton.

(Daŭrigota)

Emeriko Madach:

„La tragedio de l' homo.“

El hungara orig. tradukis:
Kolomano Kalocsay.

Ĝojplene ni prezentas ĉi tiun majstroverkon de la hungara literaturo al nia legantaro. Pri la verko ni skribas nenion: ĝi parolas per si mem, kaj la nomo de la tradukinto sufiĉas, ke ni certigu pri la majstrotraduko. Kalocsay ĵus gajnis la premion de la Esperanta Akademio kaj per tiu ĉi fakto li farigis la „spirita majstro de nia lingvo“. Jen la mallonga enhavo de la antaŭaj scenoj, el kiuj ĉio sole ankaŭ estas tutplene komprenebla:

Adamo, la korpigo de l' homo, post kiam li estas forlasinta Dion kaj sekvinta Lucifer-on volas scii la historion de la estonta homaro. Lucifero dormigas lin: Adamo kun lia edzino Eva travivas la grandajn epokojn de la historio, li batalas por la homaro, sed ĉiam li malsukcesas. Tia batalo estas ankaŭ la sekvonta Falanster-sceno. Sed parolu ĝi mem:

Falanster-bildo.

(Korto de U-forme konstruita grandioza falanstero. La parteroj de la du aloj prezentas malfermitajn halojn kun kolonoj. En la dekstra halo laboristoj okupiĝas inter moviĝantaj radaj vapormaŝinoj. En la maldekstra, kiu estas muzeo de plej diversaj natursciencaj objektoj, de mekanikaj, astronomiaj, hemiaj instrumentoj kaj de aliaj specialaĵoj, laboras scienculo. Ĉiuj aperantaj al la falanstero estas egale vestitaj. Adamo kaj Lucifero maldronas el la tero en la mezo de la korto. Taglumo.)

ADAMO.

Al kia land', popolo nun ni venas?

LUCIFERO.

Ideoj ĉi malnovaj malaperis.
Patruj'? — ĉu ne ide' bagatelema?
La antaŭjuĝo naskis iam ĝin,
Malvastanimo, konkurenc' defendis.
La tuta ter' — nun jam patrujo vasta,
Kaj ĉiu hom' — kunal al cel' komuna.
Kaj ĉe l' trankvila flu' de l' hela ordo
Scienco gardestaras respektate.

ADAMO.

Do plenumiĝis mia idealo!
Tre brave, ĝuste tiel mi deziris.
Nur solan mi bedaŭras, la patrujon.
Ĝi povus resti ja, mi opinias,
Eĉ en la nova ord'. La hom-animo
Deziras barojn, timas la senlimon,
En la intenco perdas, vastiĝinte,
Sin kroĉas al Estinto kaj Estonto.
Mi timas: ĝi ne tiom entuziasmos
Por granda mondo, kiom por la
tomb' de l'
Gepatroj. Kiu sian sangon verŝus
Por sia familio — tiu havas
Por la amiko maksimume larmojn.

LUCIFERO.

Jen, vian idealon vi forjetas
Jam antaŭ ol ĝi plenumite pretas.

ADAMO.

Ho, tute ne, mi sole scivoliĝis
Pri la ideo, kiu la tut-mondon
Kunfandas, kiu la entuziasmon:
Eternan, sanktan fajron de l' homkoro,
Ekspluatitan ĝis nun nur por luktoj
Malnoble incititaj, vante-revaj,
Kondukos fine al pli nobla celo.
Sed nomu do la lokon — poste gvidu,
Ke mia kor' plezuru pro l' feliĉo
Kiun la hom' post tiom da bataloj
Ricevis kiel indan rekompencan.

LUCIFERO.

Jen falanstero, unu el la multaj:
La hejm' de l'homo de ideoj novaj.

ADAMO.

Do venu!

LUCIFERO.

Halt', ne tiel rapidante.
Antaŭe — for malnovan nian haŭton!
Se ni alvenus nun kiel Adamo
Kaj Lucifer' — la sciencula mondo
Ne kredus je ni, kaj ni neniigus,
Aŭ oni en retorton fermus nin!

ADAMO.

Kiaj sensencaj vortoj jam denove!

LUCIFERO.

Ja, tiel estas en la mond' spirita!

ADAMO.

Nu, faru do laŭ plaĉo, sed rapide.
(Lucifero ilin ambaŭ transformas similaj al
la falansteranoj.)

LUCIFERO.

Jen, prenu, vesto. For harbuklojn viajn.
Ni pretas.

ADAMO.

Al la sciencul' ni iru.

LUCIFERO.

Saluton, sciencul'.

SCIENCULO.

Ne ĝenu min
En grandlabor'. Babili mankas tempo.

LUCIFERO.

Domaĝe! Nin, sciencul-kandidatojn
De l' mila falanstero, logis via
Grandega famo tiel malproksimen.

SCIENCULO.

Fervor' laŭdinda, vere! Sed ja mia
Laboro povas iom paŭzi nun.
Nur varm' ne malpliĝu en retorto.
Al mia vol' la materi' jam cedos.

LUCIFERO

Mi ne eraris do: eĉ en vi, kiu
Trafiltris jam la homon kaj naturon,
Postrestis, kiel lasta skoriaĵo,
La vanto.

SCIENCULO.

Nun, ni povas distri nin.
Al kia fak' vi apartenas propre?

ADAMO.

La scideziron ni al fak' ne ligas,
La tuton ni deziras trarigardi.

SCIENCULO.

Erar'! En eto kaŝas sin la granda,
Objektoj multas, nia viv' mallongas!

ADAMO.

Nu, certe. Ja necesas iu ankaŭ
Por porti sablon kaj por ĉizi ŝtonon
Palaco ne leviĝus ja sen li;
Sed li nur en mallumo erarvagas,
Eĉ ne konjektas, kion li prihelpas.

La tuton vidas nur la arkitekto:
Kvankam ne povas ĉizi unu ŝtonon,
La verkon nur li kreas, kvazaŭ Dio.
En la scienco same: granda estas
Nur tia arkitekto.

LUCIFERO.

Kaj pro tio

Ni venis nun al vi, ho granda homo.

SCIENCULO.

Vi bone agis, mi aprobas vin.
La riĉaj branĉoj de l' scienc', la multaj
Apartaj trajtoj de ĉi organismo,
Nur kune ĉarmas.

LUCIFERO.

Kiel belulino.

SCIENCULO.

Sed tamen, sole la ĥemio estas . . .

LUCIFERO.

La mezo kie loĝas ĝia vivo.

(Daŭrigota.)



Skoltismo

SKOLTAJ TERMINOJ

De Avoto, Prez. S. E. L., Anglujo
II — Rangoj

En mia unua artikolo mi difinis,
per frazaro, diversajn vortojn derivitajn
el la radiko „skolt“.

Mi nun proponas trakti, laŭ sama
maniero, pri grupo da vortoj, kiu
indikas la rangojn de skoltistoj kaj
knaboj.

Skoltiston, kiu estras nacian
skoltan organizaĵon, ni nomas ĉef-
kolto, kaj tiu, kiu helpas lin kaj foje
deputiĝas por li estas subĉefskolto.
Ekzemple, la plejaĝa filo de la Reĝo
de Granda Britujo, Princo Eduardo
de Kimrujo, estas samtempe Ĉefskolto
de Kimrujo. Sub la ĉefskolto
povas esti kelke da ĉefkomisaroj
kaj subĉefkomisaroj, kiuj lin
reprezentas en diversaj partoj de la
lando. Post ili venas provincaj
komisaroj, tiam distriktaj kom-
misaroj, kiuj estras respektive pro-
vincajn kaj distriktajn asociojn,
helpate de siaj subkomisaroj.

Irante ankoraŭ malsupren, ni
havas ĉeftrupestrojn, trupestrojn,
kaj subtrupestrojn. Tiu ĉi estas
la plej malalta rango el skoltistoj.

Post ili ni havas la tri rangojn
de ofico por la knaboj: ĉefrotestro,
rotestro, subrotestro. Skolto, kiu
ne havas oficon (kaj tiun klason kom-
preneble formas la plimulto el la
movado), estas rotano. Se li ne
apartenas al aparta roto, li estas tru-
pano; se ne al aparta trupo, li estas
solskolto. Grupo konsistas el du
aŭ pli da rotoj, kune kun unu ĉefro-
testro, unu aŭ pli da subtrupestroj,
kaj unu trupestro. Roto konsistas
el unu rotestro, unu subrotestro,
kaj kvar, kvin aŭ ses rotanoj.

(Daŭrigota.)



Skolta Esperantista Ligo.

Skoltismo estas bazita je la sekvanta
leĝaro. Tiu ĉi estas la Brita, sed ĉiuj landoj
havas similan leĝaron, kaj milionoj da ge-
junuloj en ĉiuj partoj de la mondo direktas
sian vivon laŭ tiuj ĉi leĝoj.

Sendube, post ne multaj jaroj, kiam la nunaj geskoltoj estos maturiĝintaj, la skolta spirito, kiun ili gajnas nun, bone efikos, kaj la mondo espereble estos pli feliĉa loko, kaj la homoj faros unu grandan familion:

1. Oni povas fidi la honoron de skolto.

Se Skolto diras „Je mia honoro ja estas“, tio signifas, ke vere estas tiel, same kiel li estus ĵurinta la plej solenan ĵuron.

Same, se Skolto diras al Skolto, „Mi fidas vin je via honoro fari tion“, estas la devo de la Skolto fari ĝin kiel eble plej bone, kaj permesi al nenio malhelpi lin.

Se Skolto rompuz honoron per mensogo, aŭ alie, li eble estus petata redoni sian Skoltan Insignon (Sian Vivon) al lia estro, kaj ne denove porti ĝin. Ankaŭ li eble devos ekŝigi el la Skolta movado.

2. Skolta estas lojala.

Al la reĝo, sia lando, siaj oficiroj, siaj gepatroj, siaj mastroj kaj al tiuj sub li. Li devas esti lojala al ili ĉiam kontraŭ ia mal-amiko, aŭ iu kiu parolas malbone pri ili.

3. Skolto devas esti utila kaj helpi aliulojn.

Li devas fari sian devon antaŭ ĉio, eĉ kvankam tio necesas, ke li fordonu sian propran amuzon, aŭ komforton, aŭ sendanĝerecon. Kiam oni estas maldecida pri ia afero, li devas sin demandi, „Kiu estas mia devo?“ — t. e. „Kiu estas plej bona por aliaj homoj?“ — kaj li devas fari tion. Li devas esti preta, ĉiam savi la vivon de dronantoj, k. t. p., aŭ helpi vunditajn homojn. Kaj li devas fari sian eblon, ĉiun tagon fari almenaŭ unu bonan agon al iu sen rekompenco.

4. Skolto estas amiko al ĉiuj, kaj frato al ĉiu alia Skolto, ĉu la alia havas diferencon socian rangon, aŭ ne.

Se Skolto renkontas alian Skolton, eĉ kvankam la alia estas tute nekonata al li, li devas al li paroli, kaj helpi lin, se necese en lia devo, aŭ doni manĝaĵon al li, aŭ per ia alia maniero. Skolto neniam estas snobo. Snobo estas homo, kiu malrespektas alian, ĉar li estas pli riĉa, aŭ pli malriĉa ol li; sed Skolto respektas la alian ĉiam. Inter Skoltoj, ĉu riĉaj, ĉu malriĉaj, ĉu britoj, ĉu alilanduloj, estas frata amikeco.

„Kim“, la knaboskolto estis nomita de la hindoj, „Eta amiko al la tuta mondo“, kaj tiu estas la nomo, kiun ĉiu Skolto devas gajni por si mem.

5. Skolto estas ĝentila.

Al ĉiuj, sed speciale al virinoj, kaj infanoj, gemaljunuloj, malsanuloj, kripluloj, k. t. p. Kaj li ne povas akcepti ion pro lia ĝentileco.

6. Skolto estas amiko al la Bestoj.

Li ŝirmas ilin de doloro, kaj tute ne mortigus ilin sennecese, ĉar bestoj estas Diaĵoj. Sed estas permesata, mortigi bestojn por manĝi aŭ bestojn, kiuj estas ofendaj.

7. Skolto obeas la ordonojn de siaj gepatroj, rotestro, trupestro sen ia demando.

Eĉ se li ricevas ordonon, kiun li ne ŝatas, li devas obei ĝin, ĉar estas lia devo; post li estas farinta ĝin, li povas veni al la ordonanto kaj diri, kial li ne ŝatas ĝin; sed li devas obei la ordonon tuj.

8. Skolto ridetas kaj fajfas dum ĉiuj malfacilaĵoj.

Kiam li ricevas ordonon kiel Skolto, li ridetas aŭ fajfas, eĉ se la ordono estas malagrabla.

Skolto neniam grumblas pri malfacilaĵoj aŭ malagrablaĵoj, sed li devas faji kaj rideti.

Kiam Skolto maltrafas vagonaĵon, aŭ dum iaj malagrablaj cirkonstancoj, li devas devigi sin rideti, kaj tiam fajfi, kaj ĉio iros bone.

La puno por la dirado de malbonaj vortoj estas, ke la Skoltoj verŝu tasegon de malvarma akvo en la manikojn de la ofendanto. Tiu estas puno elpensita de Kapitano Johano Smith, Brita Skolto, antaŭ 300 jaroj.

9. Skolto estas ŝparema.

Tio estas, li ŝparas ĉian moneron, kiun li povas, kaj metas ĝin en l'ankon, por ke li ne estu senmona, kiam li estos senlaborulo aŭ malsana, kaj tiel li ne devos dependi por la vivrimendoj je aliuloj; aŭ por ke li povu doni monon al aliaj, kiuj ĝin bezonas.

10. Skolto estas pura je penso, vorto kaj ago.

T. e. li sentas kompaton al junulo, kiu parolas maldece, kaj li mem ne permesas sin esti tentata aŭ paroli, pensi aŭ fari ion maldecan. Skolto estas pura kaj vira.

Ĉiuj legantoj facile povas trovi la leĝon, sur kiu le S. E. L. estas fondita. La 4an!

Ĉiuj Skoltoj devas esti amikoj — ja fratoj. Tiu ĉi, rilate al nia Ligo, helpas la laboron de la Societo de Nacioj je Ĝenevo, kiu ankaŭ helpas Skoltismon. Antaŭ ne longe ĝi rekomendis al la diversaj Eŭropaj registaroj, doni specialajn fervojbiletrabaton al Skoltoj vagantaj aŭ tendarantaj en siaj landoj. Kelkaj registaroj jam konsentis. En Danujo dum la Jamboreo du Skoltoj povis veturi aŭ trame aŭ vagonare per unu bileto. En Britujo Skoltoj ne ankoraŭ 16 jaraj povas veturi je kvarone de la ordinara prezo, kaj Skoltoj de 16 ĝis 18 je duone de la ordinara prezo. En Belgujo, Svisujo kaj

aliaj landoj, mi kredas, ke nun estas similaj rabatoj, kaj mi volas, ke S. E. L.-anoj en tiaj landoj min sciigu pri ĉi tiu afero, por ke mi per „E. J.“ sciigu ĉiujn S. E. L.-anojn, por ebligi al ili ŝpari monon kiam ili vojaĝas.

Mi tre esperas, ke ĉiu membro ĉiam portas sian membrokarton kiel pasporton kaj insignon, kiam li vojaĝas.

Multaj membroj ne ankoraŭ aĉetis insignon, tial mi iln petegas, sendi tuj unu ŝilingon al mi, tiam mi tuj sendos insignon al ili. Ĝi estas bona propagandilo!

Jen alia grava afero! De post la apero de la lasta „E. J.“ mi ricevis leteron de Zaragossa en Hispanujo pri la proponita kunigo de S. E. L.-anoj proksiman jaron en tiu urbeĝo.

Kun ĝojo mi povas sciigi, ke jam 20 Zaragossaj Skoltoj eklernis Esperanton por kunparoli kun ni. La Skoltestraro kaj Konsilantaro ankaŭ tre interesigis kaj entuziasmiĝis pri Esperanto. Kaj mi nun alvokas ĉiujn S. E. L.-anojn, kiuj povas viziti tiun belan urbon proksiman Julion, tuj al mi sciigu.

Oni povas tie organizi tendaron por miloj da Skoltoj se necese, se ne tre multaj povos iri oni loĝos ĉe privataj hejmoj.

Ĝis nun S. E. L. ne havis grandan Tendaron. 20 el ni tendaris en Belgujo, kaj kelkaj ĉestis la Jamboreon en Danujo, sed mi ŝatus renkonti kaj loĝi kun 300 S. E. L.-anoj. Kion vi opinias? Profunde pensu pri la afero, tuj ekŝparu monon kaj tuj skribu al mi pri via intenco ĉeesti, kaj ni havu grandan sukceson!

Salutojn!

Norman Booth,
Ĝenerala Sekretario,
Skolta Esperantista Ligo,
Netherton, Huddersfield,
Anglujo.



Oficiala informilo de T. E. A. J.

Sekretario: A. Neupert, Leipzig-Möckern,
Wedellstr. 17.

Estraro. Por plejeble simpligi la ofic-laborojn de la estraro, s-o Pivl surprenis sur sin la laborojn de ĉef-

redaktoro de EJ, ĉar li kiel ĉeĥoslovakio facile povas interrili kun la presejo. La laborojn de sekretario de TEAJ faras s-o Neupert, kiu jam de post 1923 laboris en la administrejo de EJ. Por garantii precizan ekspedadon de EJ, li estonte ankaŭ dissendos ĉiujn ekzemplerojn de EJ al la ĉefdelegitoj kaj izoluloj escepte de tiuj al ĉeĥoslovakioj.

Ĉefdelegitoj. Kun granda ĝojo ni informas niajn amikojn, ke kelkaj eminentaj samideanoj estas pretaj funkcii kiel ĉefdelegitoj de TEAJ. Liajn adresojn vi vidas sur la titola paĝo de ĉi tiu n-o. Sed ankoraŭ mankas reprezentantoj en kelkaj gravaj landoj. Laboremuloj petu informojn de la sekretario.

Novaj delegitoj. Ni intencas presigi landajn delegitarojn, kaj pro tio ni petas la ĉefdelegitojn, ke ili sendu plej eble baldaŭ liston de siaj landaj delegitaroj.

Kotizpago. Pagu tuj vian jarkotizon al via loka delegito aŭ, kie tia ne estas, al la distrikta, ĉefdelegito aŭ rekte al la administracio. Grupoj povas pagi kvaronjare, sed sufiĉan tempon antaŭ la komenco de ĉiu kvaronjaro, alie ni ne povas garantii la ricevon de la gazetoj.

Ĉefdelegito por Orienta Azio:

S-o Inocento Ŝeriŝev, P. O. Bose 35,
Ĥarbin, Novij-Gorod, Manĉurio, Ĥinujo.

Alvenis interŝanĝgazetoj jenaj:

„Litova Stelo“, A. Dombrovski, Rotušes
aikšte 6, Kaunas.
„Germana Esperantisto“, Berlin SW 61,
Wilmsstr. 5.

„Marto“, J. Taubmann, Haida, Böhmen, Ĉeĥosl.
 „Norvega Laborista Esperantisto“, Folkets Hus, Kristiania.
 „International Language“, (N-o 11) 17 Hart Street, London W. C. I.
 „La Unuigita Tuthomaro (N-o 12) Hamburg



Oni debatas

Kial ne plivigliĝas la korespondado ?

Lastatempe de tre multaj flankoj alvenis plendoj rilate korespondado. Oni sendas leteron kaj ofte ne ricevas respondon. Vana, oni diras, estas la peno, perdita multe da mono, forflugitaj ĉiuj esperoj kaj fine restis nur malĝojo pro la mallerteco, kaj ni devas konfesi nur pro la malĝentileco de iuj Esperantistoj. Jes, li koleras kontraŭ la tuta Esperantistaro, ĉar laŭ unuopulo li juĝas nian tutan aron, kaj se la skribinto estas ankoraŭ nova Esperantisto, tiukaze signifas nerespando la perdon de unu el la estonta Esperantujo.

Vane ni serĉas la kaŭzon. Kelkfoje ŝajnas esti kulpa nur la forsendinto mem, sed ni devas konstati, ke tio apartenas nur al la plej maloftaj okazoj. Plej ofte okazas, ke la anoncinto, ricevante tro multe da leteroj, ne respondas al ĉiuj, sed nur al kelkaj feliĉuloj gajnintaj sian simpatian, la aliaj devas kontentiĝi pri la fakto, ke la anoncinto tralegis la leteron, akceptis la sendaĵon, sed egalvaloron li ne resendis.

Jen, kio devas nepre ĉesi! Oni ne povas propagandi, dum la fakto mensogigas nin kaj la rezultato atingita de la komencanto pere de Esperanto estas nur perdo de tempo kaj mono. Pro tio la nova estraro de T. E. A. J. decidis, ke jena bedaŭrinda fakto ĉesu kaj akceptis sekvantan rezolucion:

Ĉiuj membroj de T. E. A. J., kies korespondanonco aperis en „Esperantista Junularo“, estas devigataj respondi almenaŭ unufoje al ĉiu letero ricevita, kies enhavo estas konforma al lia anonco, alie li la unuan fojon estas avertata de la prezidanto, la duan fojon oni publikigas lian nomon sub speciala rubriko en „Esperantista Junularo“, la trian fojon la koncerna membro estas eksigata el la asocio

Ni esperas, ke niaj membroj aprobo tion-ĉi kaj ke neniam estos necesa la apliko de tiagrada puno.

(A. Rácz)

Nota: En propra intereso ni petas tuj sciigi al ni la nerespondon de iu anoncinto, ĉar ni intencas severe procedi kontraŭ tiuj parasitaj nerespondantaj, kiuj grave malhelpas la progreson de Esperanto. Adreso por tiurilataj plendoj: Rudolf Pivl, Trautemau, Pragerstraße 16, Ĉeĥoslovakujo.

„-ujo; -io“

S-o P-ro Cart bonvolis atentigi nin, ke la Akademio decidis pri la landnomoj jam en 1922. Volonte ni submetas nin al tiu decido de l' Akademio, kaj la fundamento por nia gazeto estos ĉiam nur la „Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto“ kaj la landnomoj tie uzataj. La neinformitecon kaŭzis certe la fakto, ke kelkaj gravaj gazetoj Esperantistaj rifuzis sciigi al siaj legantoj la akademian decidon. En la landnoma demando ni konservos plenan fidelecon al la Akademio, ĉar la sistemo uzata de kelkaj aliaj asocioj nur povas konduki al plena anarĥio.

Redakcio de
 „Esperantista Junularo“



Diversaĵoj

Pli ol 10.000 Esperantistoj, kiuj apartenis al landaj. Esp. organizaĵoj en 1924.

Kataluna E. T.	300
Germana E. A.	2500
Japana E. I.	2282
Riga E. S.	100
Litova E A	51

C. Dana E. L.	200
Norvega E. L.	100
Nederlanda S.	300
Svisa E. S.	350
Brita E. A.	1200
G. E. L. en Ĉeĥosl.	800
Pola E. A.	?100
Itala E. F.	?100
Rumana E. S.	220
Brazila L. E.	250
Hungarl. E. S.	200
Austruja E. D.	?200
Ĉeĥosl. A. E.	500
S. Franca P. E.	1056
Belga L. E.	400

Internacia Studenta Esperantista Asocio,

Sekretariejo: Ignacy Koss, Warszawa,
Leszno 28. m. 13. Polujo.

La 17-a Esperanto-Kongreso en Ĝenevo.

La kongreso okazos la 3-an ĝis 7-a de Aŭgusto 1925. La kotizo estas 25 svisaj frankoj. UEA-membroj pagas nur 20 sv. fr.; se ili estas junuloj malsuper 20 jaraĵ, ili nur pagas 15 sv. fr. Frua aliĝo estas rekomendata por helpi la aranĝon. Adreso: 17. Universala Kongreso de Esperanto, 12. Boulevard du Théâtre, Genève, Svislando. (El la 1-a kongresa bulteno.)

El japana letero:

„ . . . Nia movado tre progresas en la tuta lando kaj la plej granda parto de niaj japanaj samideanoj estas junaj universitataj studentoj . . . ”

El dana letero:

„ . . . En Odense ni fondis Esperantan gejunularan societion, kiu nun havas 35 membrojn; prezidanto estas s-o J. Kjoer . . . ”

Weinböhl en Saksujo

estas loko, kiu havas 7000 geloĝantojn, 900 gelernantojn, inter kiuj estas pli ol 100 Esperanto infanoj, nome

en la	1-a klaso (8-a lernjaro)	36
„	2-a „ (7-a „	33
„	I. 3-a „ (6-a „	32
„	II. 3-a „ (6-a „	34
		<hr/> 135

Medicin-studentoj!

Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio (Teko) alvokas vin: Subtenu laŭ via eblo ĝin per libera laŭpova sendado de mono de tempo al tempo. Sendu vian propran aliĝon kaj la adresojn de ĉiuj konataj fakanoj al D-o Maksimiljano Blassberg en Krakow (Polujo), Starowislna 18, aŭ D-o Milan Crlenjak en Zagreb (Jugoslavio), Palmotie ul. 20/1, aŭ D-o Sos en Wien I., (Austrujo), Tuschlauben 18.

Bedaŭrindaj ĥinaj infanoj!

La Komisiono pri Infanlaboro de la urbestro de Shanghai lastatempe eldonis raporton pri la kondiĉoj en fabrikejoj kaj similaj stablaĵoj. La raporto resumas en jenaj vortoj:

„ . . . La Komisiono vidis tre multe da infanoj laborantaj, kiuj ne povis havi pli ol ses jarojn. La laborhoroj estas ĝenerale dekdu tage kun ne pli ol unu libera horo por manĝi. Ofte la infanoj devas stari la tutan tempon de la laboro. En multaj industrioj oni laboras tage kaj nokte en du vicoj de dekdu horoj. La kondiĉoj pri atmosfero kaj polvo estas tre ofte malbonaj . . . Kelkafoje la infanoj ricevas nenion, kaj iliaj vivkondiĉoj estas efektive tiuj de sklaveco. ”

(Internacia Labor-Oficejo, Novembra Bulteno.)

Praha:

Fino instruistino J. Supichová gvidas esperantan rubrikon en la ĉeĥa porjunula gazeto „Malý Čtenář“ (Malgranda leganto). Pli ol 150 lerantoj laŭ ĉi tiu rubriko (gramatika kaj kronika) lernas Esperanton.

Warszawa:

Komencante de kuranta lernjaro Esperanto estas edukita kiel deviga lernobjekto en gimnaziaj kursoj de s-o Sekulowicz, Warszawa, Zórawia 42.

Leterkesto.

(Sub tiu ĉi rubriko ni respondas al demandoj, kiu havas ĝeneralan intereson aŭ ne estas tro urĝaj por devigi tujan skriban respondon.)

Al niaj kunlaborantoj! Pro manko da loko ni ne povas publikigi kelkajn, tre bonajn manuskriptojn. Aperos: Tri rakontoj de J. P. Hebel, La karaktero, Por korespondantoj, Pluvo, La kaverno de Steentoll, Unu, kiu ludas kun Dio. Ankoraŭ necerte: Imperiestro kaj bakistedzino, Sur la grenkampo; La elveturado. Ne aperos: Famoj; Historio pri la parolanta hundo; Penseroj. Koran dankon al ĉiuj kaj ne ĉagreniĝu tiuj, kies artikolojn ni rifuzis.

P.

Manuskriptoj. Ni havas multe da kunlaborantoj! Bedaŭrinde ni ne povas presigi ĉiujn bonajn manuskriptojn, ĉar ni ne povas plampleksigi la gazeton riskante ĝian regulan aperon pro financaj kaŭzoj.

Filatelio. Ni intencas starigi apartan fakon por filatelio en EJ, kiun redaktos ĉeĥa TEAJ-ano. Instigojn bonvolu sendi provizore al s-ano Pivl, la ĉefredaktoro de EJ.

Al niaj interŝanĝgazetoj. Ni petas vin bonvolu sendi la viajn gazetojn nur al la ĉefredaktoro.

Goba. Manuskriptoj alvenis. Kelkaj povas aperi. Ni preferas prozaĵojn. Sendu pluen. Dankon antaŭe. Abono por 1925 en ordo.

Materialon por la venonta n-o vi sendu al la responde redaktoro ne pli malfrue ol 3 semajnojn antaŭ la aperdato.

Abonprezo. Kvankam la jarkotizoj por EJ estas tiel modestaj, ke ni havis deficiton en 1924, kiun pagis resp. prunte donis oferemaj samideanoj, ni tamen ne plialtigis la kotizojn por 1925, ĉar la junularo ĝenerale estas malriĉa kaj ni ĉefe intencas plimultiĝon de la abonantaro.

Pagfakturo. Ĉar ĉiu delegito povas facile prikalkuli sian al la administracio pagotan sumon, ni ne sendas fakturon.

Afranko de poŝtaĵoj. Ni devis pagi punon por poŝtaĵoj nesufiĉe afrankitaj al ni, precipe el Polujo. Estonte ni rifuzos la akcepton de tiaj sendaĵoj.

Esperanta Junula Biblioteko. Nia devizo estas: Antaŭenmarŝu paŝon post paŝo! Ni nuntempe nur povas eldoni aldonaĵojn al EJ, kiuj kolektitaj estos bindeblaj je libretoj. Tiuj formos volumojn de EJB.



Anoncetoj.

(Mallongigoj: l=leteroj, pk=poŝtkartoj, pi=poŝtkartoj iustiritaj, bfl=poŝtmarkoj sur la bildflanko, pm=poŝtmarkoj.)

Studento A. Ozols, Riga, Latvujo, Dzirnavu ielā 7, dz 3, studenta societo „Patria“ deziras korespondi kaj interŝanĝi pi kun junaj esperantistinoj ĉiulandaj.

70 studentoj, 13-17 jaroj, de la „Bundeserziehungsanstalt Traiskirchen“ deziras korespondadi, ŝanĝi pm, pi (bfl) Adreso: Dir. Dro Watzke (por Esperanto-studentoj), Traiskirchen, Aŭstrujo.

20 13-15-jaraj lernantoj en la kvina klaso de la Beskova Lernejo, Stockholm, Svedujo, deziras korespondi kun alilandanoj kaj ŝanĝi gazetojn, pm, pi, ktp. Adresu al: Rektor Sam Jansen, Stockholm, Svedujo.

S-o Rud. Charbulak, Hranice, Moravio, Ĉehosl.-serĉas korespondantojn por siaj 40 18-30-jaraj kursanoj.

S-oj Wilhelm Ueberlein (21 jara) kaj **Alfred Ueberlein** (17 jara), Fellhammer-Süd, Kurze-Str. 3, Schlesien, Germ.-deziras korespondadi.

K-do D. Gavrilcik, Moskva, pokreĉka. dom. 4. kv. 26. Rusujo (studento). - deziras korespondi pri elektrotekniko kaj sporto

S-o H. Madsen, St. Glasvej 23, Odense, Danujo, - serĉas korespondantojn por 9 infanoj.

S-o A. Piltz, gimnaziano, Beskows skola, Stockholm, Svedujo. - korespondas pri geografiaj aferoj.

F-ino instruistino E. Liljenquist, Beskows skola, Stockholm, Svedujo - deziras ŝanĝi laboraĵojn de lernantoj, desegnaĵojn ktp.

S-o D. B. Albanov, Simferopol, Ruslando, Bitakska 17, - interŝanĝas kaj korespondas kun ĉiuj landoj.

S-o Paul Glöckner, Pirna a. E., Germanujo, - serĉas korespondantojn por si kaj siaj 34 gelernantoj.

S-o Franz Rotter, ĉe teksta faka lernejo, Sorau, a L Ziegeleiweg 6, Germanujo, deziras korespondi, preferé kun f-inoj.

S-o Gerhard Wrbetz, Trautenau, Uniongasse, Ĉeĥoslovakujo, deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Respondas ĉiam.

S-o A. Bendravičius, lernanto, Lazdijn Gimnasia, seinu Apska, Litovujo, deziras korespondi kun la tuta mondo.

„Die Briefmarke“

Germanlingvanoj abonu la filatelian gazeton „Die Briefmarke“. Provekzempleroj de la eldonejo: „Die Briefmarke“, Teplitz-Schönau, Ĉeĥoslovakujo.

„Esperanto“

Organo de Universala Esperanto Asocio, 12 Boulevard du Théâtre, Genève, Svislando, monata gazeto, oficiala jarlibro de la Esperanto movado, deligitoj en pli ol 1200 lokoj de la terglobo.

Aĉeton de Esperanto-Libro kaj aliaj Esperantaĵoj

perigas la administracio de E. J. post antaŭpago kaj aldone de plio da 20% al la pagota sumo por sendkostoj.

Jus aperis la fama traduko de K. Kalocsay
E. Madach: „La tragedio de l' homo“

Mendebla ĉe nia administracio.

Prezoj: simpla eldono 0 80 dol.
luksa eldono 1 20 dol. aŭ egalvaloro

„Hungara Esperantisto“

oficiala organo de H. E. S. kaj H. E. A. L.
Adreso de Redakcio kaj administracio:
Dr-o J. Tarács, Budapest IV, Váci-u. 7 1 12.
Jarabono 3 oraj frankoj, eksterlanden 4 50 Fr.

**Ĉiuspecaj preslaboroj estas plej bonege
farataj — ankaŭ en Esperanto — ĉe
Dr. Karl Pickert, Ges. m. b. H.,
Buchdruckerei en Leitmeritz Bohemio.**

La gazeto, kiun legas ĉiu Esperanto-infano, -junulo junulino kaj amiko de la Esperanto-junularo, estu

Esperantista Junularo.

La gazeto por ĉiu Esperanto-instruisto, -edukisto kaj kursgvidanto estu

Novaj Tempo.

Specimenojn dissendas la administracio de E.J.

ABONU LA GAZETON

„Heroldo de Esperanto“

antaŭe

„Esperanto Triumfonta“

Duonsemajna - Aktuala
Grandformata
Ilustrita

Senpagajn specimenojn petu de l' Administracio

HORREM B. KÖLN
GERMANLANDO.

Ĉiu T. E. A. J. - ano uzu por siaj korespondadoj nur la

Leterpaperon

eldonitan de la administracio de E.J. Mendu tuj, ĉar ni nur pri relative malgranda nombro da paperoj disponas.

Prezo por 25 pecoj : 1 ormarko
(Revendistoj ricevas 10% da rabato.)

SPECIALA KOMERCEJO POR KAŬĈUK-

metal-, brul- kaj poŝtŝtampiloj, por paĝnumerig- kaj broŝurmaŝinoj, por firmo-, reklamo- kaj diversaj komercaĵoplatoj fabrikataj el emajlo, vitro, porcelano kaj el gravurita ligno, plue por ŝtampa reliefigo, litografio kaj litografia reklamo.

E. M. Preißler, Trautenau

Wassergasse 10, Ĉeĥoslovakio.

Al progresemaĵ germanlingvaj junuloj ni rekomendas la abonon de

„Junge Menschen“

(Junaj Homoj)

Monata gazeto por politiko, arto, literaturo kaj vivo.

Informojn donas la eldonejo:

Hamburg 13, Johnsallee 54

Rekomendata de la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto!

La eldonon de la sola arta literatura monata esperanta revuo

Literatura Mondo

transprenis:

Hungara

Esperanto Instituto

Budapest VI., Eötvös - u. 3,

....

Ĉiu grupo kaj literaturamanto nepre helpu la gazeton per abono kaj disvastigo!

....

Po N° sv. Fr. —.80 aŭ \$ —.16

Abonejo:

Administracio de E. J.

Responda redaktoro: R. PIVL, TRAUTENAU, Pragerstraße 16, Ĉeĥoslovakio.
Eldonejo kaj presejo: Dr. KARL RICKERT, LEITMERITZ, Bohemio.

Esperanto kaj junularo.

Trarigardante la historion de ĉiuj-ajn grandaj, evoluigaj movadoj, ĉu politikaj ĉu religiaj, ni ekvidas, ke oni ĉiam klopodis kaj klopodas gajni la lernejon, kaj per ĝi la junularon. Posedi la lernejon, jen ĉies devizo.

En la hodiaŭa vivo ludas la plej gravan rolon „Lia Moŝto, la mono“. Ĉiu krias „Monon!“, kaj movado sen mono estas neblajo. Kaj la junularo — vi ja ankaŭ estis iam junulo — estas tre malriĉa, sed inter ĝi vi trovas tre fervorajn Esperantistojn. Ili volas labori, sed ili povas preskaŭ nenion fari, ĉar mankas al ili mono. La

Universala Esperanto-Asocio Junulara

suferas tre pro manko da mono kaj ĝia oficiala organo, la 8-fojojn dum la jaro aperanta

Esperantista Junularo

nur povas vivi dank'al la malavara helpo de kelkaj Esperantistaj instruistoj. Samideanoj, ne lasu pereiti, kion la junularo kreis per propra forto dum multjara laboro! Helpu aligante.

Jarkotizo: 4 ~~obla~~ ^{2.} eksterlanda ~~leteralrango~~.

Kiel subtenanta membro povas aligi ĉiu, kiu havas intereson pri junula movado kaj deziras subteni ĝin, aktivaj membroj povas fariĝi nur junuloj. La rajtoj de ambaŭ membropecoj, estas la samaj, ekz. aktivaj kaj subtenantaj membroj povas fariĝi delegitoj de U. E. A. J., ktp.

Por aligi vi povas uzi la ĉi-suban aligilon. Sendu ĝin al la landa ĉefdelegito, kaj se tia ne ekzistas, rekte al la administristo

*Omni termini rim al mi kun foto kumbelji tempore
Miaflanke mi petas subteni la junularon kie estas la estonteco
resendo de ganto signifas rifuzo.*

A.O.

A. Neupert
Leipzig-Möckern
Wedellstraße 17
(Germanio).

Estimata Koleg(in)o

Mi sendas al vi la lastan numeron de la jaro 1913-1914 de 'Internacia Pedagogia Revuo'. Ĝi estis preta por forsendi, kiam la terurega mondmilito malhelpis nian laboron. Pri la mona stato de 'Internacia Asocio de Instruistoj' mi raportus en la fakaj kunsidoj dum la IXa.

Pro la malfacilegaj situacioj kreitaj de la milito, mi ne ankoraŭ povis pensi nek pri la restarigo de nia asocio nek pri la reeldonado de nia revuo. Tamen nun, pro la diversaj petoj de gekolegoj, mi opinias ke ni devas kaj povas repreni nian agadon. Sed por bone sukcesi ni devas havi almenaŭ 200 anojn. La kotizaĵo de I. A. I. kun jarabono al I. P. R. estos 10 frankojn belgajn. (La preskostoj kvinobligis!) I. P. R. aperos en tutsama formo kiel antaŭe. Do sendu TUJ (ne prokrastu!) vian kotizaĵon. Ĉiumonate la revuo necesas 150 frankojn. Ĉiufoje kiam ni havos do tiun sumon ni tuj presigos kajeron. Mi petegas vin, ne malhelpu la reaperon per malutila hezitado. Mi certigas vin je mia honoro ke via mono neniel perdiĝos. Mi ne celas monprofiton; mi nur deziregas per Esperanto plibonigi la tutmondan instruadon per la kunlaborado de gekolegoj ĉiulandaj.

Jan JACOBS
Red.-Adm. de I. P. R.
Boomsche steenweg, 444
Antwerpen (Belgio)